

Gonçalo Neves

Ekesto, evoluo kaj estonteco de *Historia Vortaro de Esperanto*

Resumo: La *Historia Vortaro* (ĉi-sekve HV) estas ampleksa konkordanco de la tuta lingvouzo de Esperanto dum difinita periodo, en kiu dokumentiĝas, inter aliaj datumoj, la plej fruaj uzoj de ĉiu vorto, radiko, derivaĵo aŭ kunmetaĵo. HV estas do PIV-aspekta vortaro, tamen plejparte sen difinoj kaj kun rigora citaĵa referencaro. Per HV oni ekzemple ekscias ne nur, kiu-kiam-kie lanĉis la radikon *am/*, sed ankaŭ kiu(j)-kiam-kie iniciatis ĉiun ĉi-radikan derivaĵon kaj kunmetaĵon (*aminda*, *amindumi*, *enamiĝi*, *geamantoj*, *gastama*, ktp). La 113-paĝa unua eldono de HV aperis en 2011 sub la titolo *Historia Vortaro de Esperanto 1887-1888*, plume de Gonçalo Neves. Por verki ĝin, la aŭtoro kronologie esploris ĉiujn skribitajn dokumentojn el tiu dujara periodo kaj metode registris ĉiujn vortojn kiuj aperas en ili. Post 2017 ankaŭ la germana esperantologo Bernhard Pabst kontribuis al la HV. Rezulte de tiu kunlaboro, aperis en 2018 la 440-paĝa *Historia Vortaro de Esperanto 1887-1889*, kun aldono de dokumentoj aperintaj en 1889, kiel la zamenhofaj *Vortaro Rusa-Internacia* kaj *Meza Vortaro Esperanto-Germana*. La estonta evoluo de HV dependos ne nur de la profesia okupiĝo de la aŭtoroj, sed ankaŭ de la intereso, kiun la verko vekos inter esperantologoj, leksikografoj kaj aliaj intelektuloj, kaj de eventuala apogo kunverka aŭ alispeca.

Ŝlosilvortoj: Vortaro; Lingvouzo; Historio de Esperanto; Zamenhofaj verkoj; Deknaŭa jarcento.

The origin, development and future of the *Historia Vortaro de Esperanto* (Historical Dictionary of Esperanto)

Abstract: The *Historia Vortaro* (HV) is an extensive concordance of the entire linguistic usage of Esperanto during a specific period, in which are documented, among other data, the earliest usages of every word, root, derivation or compound. HV, then, resembles the *Plena Ilustrita Vortaro*, but for the most part without definitions and with a rigorous list of citations. By means of HV one can discover, for example, not only who when and where launched the root *am/*, but also who when and where initiated every definition and compound from this root (*aminda*, *amindumi*, *enamiĝi*, *geamantoj*, *gastama*, etc). The 113-page first edition of

HV appeared in 2011 under the title *Historia Vortaro de Esperanto 1887-1888*, from the pen of Gonçalo Neves. To compose it, the author conducted a chronological search of all written documents from that two-year period and methodically recorded all words that appeared in them. After 2017 the German Esperantologist Bernhard Pabst also contributed to the HV. As a result of this collaboration, in 2018 the 440-page *Historia Vortaro de Esperanto 1887-1889* appeared, with the addition of documents appearing in 1889, for example Zamenhof's *Vortaro Rusa-Internacia* and *Meza Vortaro Esperanto-Germana*. HV's future development will depend not only on the professional responsibilities of the authors, but also on the interest that the work generates among Esperantologists, lexicographers and other intellectuals, and on possible support through collaboration or in other ways.

Keywords: Dictionary; Language use; History of Esperanto; Zamenhof's writings; Nineteenth century.

Origem, desenvolvimento e futuro do *Historia Vortaro de Esperanto* (Dicionário Histórico de Esperanto)

Resumo: O *Historia Vortaro* (doravante HV) consiste num levantamento abrangente do uso do esperanto durante um período definido, no qual, entre outras informações, são documentados os primeiros usos de cada palavra, raiz, derivado ou composto. O HV é, portanto, um dicionário nos moldes do PIV, mas menos focado em definições e com um rigoroso sistema de citação de referências. Por exemplo, o HV regista não só quem-quando-onde lançou a raiz *ami/*, mas também quem-quando-onde iniciou as derivações desta raiz (*aminda*, *amindumi*, *enamiĝi*, *geamantoj*, *gastama*, etc). A primeira edição do HV (113 páginas) foi lançada por Gonçalo Neves em 2011, sob o título *Historia Vortaro de Esperanto 1887-1888*. Para escrevê-lo, o autor pesquisou cronologicamente todos os documentos escritos naqueles dois anos e registou metodicamente todas as palavras encontradas. Desde 2017, o esperantólogo alemão Bernhard Pabst passou a contribuir para o HV. Como resultado, o *Historia Vortaro de Esperanto 1887-1889* (440 páginas) foi lançado em 2018, com o acréscimo de documentos publicados em 1889, como o *Vortaro Rusa-Internacia* e o *Meza Vortaro Esperanto-Germana*, ambos de Zamenhof. O desenvolvimento futuro do HV dependerá não apenas do envolvimento profissional dos autores, mas também do interesse que a obra venha a despertar entre esperantistas, lexicógrafos e outros intelectuais.

Palavras-chave: Dicionário; Uso da língua; História do Esperanto; Escritos de Zamenhof; Século XIX.

1. Kio kaj kia estas la Historia Vortaro¹

La Historia Vortaro (ĉi-sekve HV)² estas ampleksa konkordanco de la tuta lingvouzo de Esperanto dum difinita periodo, en kiu dokumentiĝas antaŭ ĉio (sed ne nepre nur) la plej frua uzo de ĉiu vorto — tute egale, ĉu temas pri radikoj, derivaĵoj aŭ kunmetaĵoj —, kun indiko pri ties aŭtoro, verko kaj paĝnumero.

HV estas do PIV-aspekta vortaro, tamen sen difinoj (krom ĉe radikoj eksterPIVaj) kaj kun rigora citaĵa referencaro (malkiel PIV, kiu svage indikas aŭtorecon nur per supermetita ^z, ^b, kc). Per HV oni do povas facile ekscii, kiu-kiam-kie unuafoje uzis ĉiun vorton en difinita periodo. Per HV ekzemple eblas ekscii ne nur, kiu-kiam-kie lanĉis la radikojn *am/*, sed ankaŭ kiu(j)-kiam-kie iniciatis ĉiun ĉi-radikojn derivaĵojn kaj kunmetaĵojn (*aminda*, *amindumi*, *enamiĝi*, *geamantoj*, *gastama*, ktp).

HV liveras kompletan informon (aŭtoro, verko, paĝnumero, citaĵo) pri almenaŭ la plej frua uzo en- kaj ekster-vortara de absolute ĉiu tia vorto. Se la plej frua uzo, ĉu vortara, ĉu ekstervortara, estas nezamenhofs, HV informas ankaŭ pri la plej frua uzo zamenhofs. Se ia vorto unuafoje aperis en letero aŭ poŝtkarto (plej ofte zamenhofs), HV donas ankaŭ la plej fruan uzon en presita verko. Se la plej frua envortara uzo troveblas en vortaro nacilingva-esperanta, HV donas ankaŭ la plej fruan uzon en vortaro esperanta-nacilingva.

HV enhavas ĉiaspecajn vortojn, inkluzive de strangaj hapaksoj, fantomaj arkaismoj kaj ĉiaspecaj efemerajoj, kiuj verŝajne registriĝis en nenia vortaro ĝis nun. HV havas karakteron iom alian, ol la ĝisnunaj vortaroj esperantaj. Ĝia celo estas ne preskriba, sed nur priskriba. Ĝi prezentas kaj dokumentas vortojn, sed ilin neniel aprobas aŭ malrekomendas. Ĝi ankaŭ ne estas difina vortaro. La leganto tuj rimarkos, ke en ĝi abundas citaĵoj, sed preskaŭ mankas difinoj. Difinon, kaj ĉiam tre koncizan, ĝi liveras nur, kiam ĝi dokumentas vorton, kiu mankas en PIV, aŭ kies senco laŭ la kunteksto evidente diferencas de tiu(j) registrita(j) en PIV. La nuna vortaro do celas ne anstataŭi la ekzistantajn vortarojn, sed nur liveri historiajn informojn, kiuj mankas en ili. Tamen HV celas ankaŭ klarecon. Tial, same kiel ITO Kanzi en sia pvz (*Plena Verkaro Zamenhofs*), en citaĵoj HV signas per postmetita ^o ĉiun arkaikaĵojn aŭ erare uzitan vorton. Tiel la leganto facile komprenas, ke temas ne pri tajperaro de la kompilanto(j).

De la kutimaj vortaroj HV diferencas ankaŭ per tio, ke ĝi obeas striktan

1 Unue prezentita en la Esperantologia Konferenco de la 103a Universala Kongreso de Esperanto, Lisbono, 2018.

2 Gonçalo Neves kaj Bernhard Pabst, *Historia vortaro de Esperanto. Berlina komentario pri la Fundamento de Esperanto, volumo 12*. Monda Asembleo Socia. 2018.

alfabetecon. Tio signifas, ke ekzemple la vorto *mallumiĝadi* aperas ne nur en sia tradicia loko, sub *lum/* (kun fontindiko kaj citaĵo), sed ankaŭ sub *mal/*, *-iĝ/* kaj *-ad/* (ĉiam kun fontindiko sed sen citaĵo). Tio havas almenaŭ du avantaĝojn: (1) per HV oni povas fari ampleksajn lingvajn studojn, kiaj apenaŭ eblas per aliaj vortaroj (ekzemple, oni povas rapide ekscii, kun kiuj radikoj kombiniĝis la sufikso *-um* en difinita periodo de nia lingvo); (2) tia duobla, ofte triobla, kelkfoje eĉ kvarobla registrado evitigas al la kompilanto(j) ne malmulte da eraroj kaj preterlasoj.

2. Antaŭaj esploroj

Jam antaŭ la publikigo de HV pluraj esperantologoj interesiĝis pri la historio de nia vortostoko. Esplorojn ĉi-kampe la unuaj verŝajne faris Corret (1907) kaj, precipe, Boulet (1907, 1908a, 1908b, 1908c), kiu publikigis interesajn listojn de «novaj vortoj», aperintaj en *La Faraono*, *La Revizoro* kaj *La Rabistoj*, zorge dokumentinte ĉiun tian vorton per citaĵo, paĝnumero kaj eĉ lininnumero.

Pli vastajn ĉi-temajn esplorojn pri nia vortrezoro faris Stojan (1929), kiu aperigis altvalorajn informojn pri la unuafojeĉo de tre multaj, precipe neoficialaj kaj neoftaj radikoj, kaj ankaŭ de pluraj derivaĵoj kaj kunmetaĵoj.³ Tamen plejofte Stojan prezentas listojn ne elĉerpajn, sed nur ekzemplodone fragmentajn, kaj pro manko de sistemeco li atribuas la unuafojeĉon de iaj radikoj al pluraj malsamdataj verkoj. Krome ne mankas eraroj,⁴ kaj la konsulto fariĝas longa kaj laciga, ĉar oni devas trarigardi la tutan esperantan parton (p. 207–468), por trovi deziratan informon ĉi-teman. Malgraŭ tiuj minusoj, la malnova verko de Stojan ankoraŭ estas sendube vizitinda minejo por ĉi-kampaj esplorantoj.

Waringhien (1989: 108–110) montras per siaj komentoj, ke li kompilis sufiĉe detalan sliparon pri la historio de niaj memstare uzataj afiksoj kaj ties kombinoj. La finaj notoj P. 108 kaj P.109 (p. 451) evidencigas, ke ankaŭ Hauptenthal faris ĉi-temajn esplorojn kaj kompilis koncernan sliparon. Tamen la rimarkoj de Waringhien ne senas je kelke da preterlasoj kaj eraroj.

3 Tiaj informoj sidas sub jenaj bibliografiaj indikoj: 1861, 1895, 1909, 1910, 1911, 1912, 1963, 1973, 1995, 2022a, 2048, 2051, 2063, 2073, 2076, 2135, 2146, 2168, 2169, 2170, 2341, 2424, 2434, 2453, 2456, 2459, 2583, 2594, 2612, 2648, 2672, 2675, 2676, 2684, 2712, 2720, 2722, 2816, 2856, 2858, 2948, 2950, 2975, 3026, 3088, 3040, 3041, 3044, 3116, 3117, 3179, 3946, 3957, 4023, 4062, 4106, 4184, 4191, 4205, 4206, 4226, 4242, 4263, 4273, 4279, 4307, 4310, 4312, 4342, 4351, 4483, 4537, 4641, 4686, 4742, 4759, 4809, 4811, 4824, 4850, 4857, 4941, 5026, 5462, 5480, 5513.

4 Ekzemple, la unuafojeĉon de *negr/* (p. 220) li atribuis al la esperanta-bulgara vortaro de Popov kaj Oreškov (1900), sed tiu radiko troviĝas jam pli frue ĉe Zamenhof (1888a: 30), se ne paroli pri tio, ke ĝi sidis jam en Lingvo Universala el 1881 (vd. pvz 1976: 112, 142).

Ekzemple, la esprimon *dank' al li datis* je 1891⁵ «sub la plumo de Zamenhof» (p. 109) en la unua eldono de sia verko, sed en la dua eldono li informas, ke Hauptenthal «malkovris unuan uzon [...] jam en 1888 sub la plumo de Grabowski (*Neĝa Blovado*)» (p. 451). Vero estas, ke jam antaŭe Zamenhof (1888: 34) ĝin ekuzis.

Pli profundan kaj sisteman esploradon pri la historio de nia vorttrezoro faris ITÔ Kanzi per sia 130-paĝa *promenado tra la komenctempaj vortaretoj* (pvz 1976: 224–353), en kiu li prezentas la rezulton de sia pacienca esplorado de 14 inkunabloj. Por ĉiu trovita radiko (kaj ankaŭ por kelkaj kunmetaĵoj) li indikas la numerojn de la inkunabloj, en kiuj ili sidas. La alfabeto ordo ebligas rapidan konsulton. Ankaŭ vizitinda minejo, malgraŭ ties mankoj kaj preterlasoj.⁶

Iom poste, en 1989, Vilborg komencis publikigadi sian elstaran Etimologian Vortaron, kies kvina kaj lasta volumo aperis en 2001. Kvankam temas pri vortaro ne historia sed etimologia, tamen la sveda esperantologo prezentas ankaŭ, por ĉiu aparta oficiala radiko, la fonton de ĝia unuafoja apero. Tre utila konsultilo, malgraŭ la manko de radikoj neoficialaj kaj kunmetaĵoj. Tamen Vilborg ne povis konsulti gravajn fruajn vortarojn,⁷ kie premieris radikoj, kies unuafojecon li atribuis al postaj verkoj, kaj krome li preterlegis kelke da radikoj en la konsultitaj verkoj.⁸

La studo de Golden (1992) pri la nomo de rivero Taĵo, ankaŭ nomata Taĥo kaj Tago, estas bona ekzemplo pri rigora scienca esploro surbaze de la samaj kriterioj, kiujn ĉia verkanto de historia vortaro nepre devas sekvi. En sia vasta kaj bunta artikolaro, cetere, tiu esperantologo plurfoje esploris la historion de difinitaj vortoj.

5 Tiun eraran unuafojecon transprenis PIV kaj bedaŭrinde ankaŭ NPIV.

6 Ekzemple, li preterlegis 5 radikojn ĉe Zamenhof 1887 (*des, doktor/, form/, London/, spert/*), 34 ĉe Zamenhof 1888a (*absolut/, akurat/, baron/, broŝur/, bum, eksplod/, ekzamen/, familiar/, fiask/, gracil/, gram/, grup/, hm, honor/, humor/, ilumin/, imperi/, interes/, kilometr/, logik/, moment/, muzik/, natur/, negr/, nu, projekt/, Prus/, redaktor/, respekt/, salon/, situaci/, soldat/, student/, tekst/*) kaj 12 ĉe Zamenhof 1888b (*ekzemplar/, ekzist/, energij/, ideal/, fakt/, komitat/, latin/, mod/, natur/, princip/, serioz/*).

7 Jen nur kvin ekzemploj: (1) *Dictionnaire Français-Esperanto et Esperanto-Français (Radikaro)*. Paris: PES 1908, 704 p.; (2) Joseph Rhodes: *The English-Esperanto Dictionary*. New York: Fleming 1908, 544 p.; (3) Émile Boirac: *Plena vortaro Esperanto-Esperanta kaj Esperanto-Franca*. Paris: Hachette 1909/1910. xxii, 430 p.; (4) Émile Grosjean-Maupin: *Dictionnaire Complet Esperanto-Français*. Paris: Hachette 1910. xxviii, 255 p.; (5) *Dictionnaire Esperanto-Français*. Paris: PES 1910. 362 p.

8 Ekzemple, li preterlegis 3 radikojn ĉe Zamenhof 1887 (*episkop/, teatr/, spert/*), 20 ĉe Zamenhof 1888a (*akurat/, eksplod/, ekzamen/, familiar/, fiask/, gracil/, gram/, honor/, humor/, imperi/, interes/, moment/, muzik/, natur/, nu, projekt/, respekt/, salon/, situaci/, soldat/*) kaj 7 ĉe Zamenhof 1888b (*Amerik/, ekzist/, ideal/, fakt/, mod/, natur/, serioz/*). Krome li atribuis la unuafojecon de *bibliotek/* al Zamenhof 1888b, kvankam tiu radiko unuafoje aperis nur en posta verko (Grabowski 1888: 4).

Informojn pri unuafojeco de tiu aŭ alia vorto oni trovas hazarde kaj dise ankaŭ en aliaj verkoj, ofte sen fontindiko. Ekzemple, Waringhien en letero al ITÔ Kanzi informas sen pliaj detaloj, ke li mem «enkondukis la neologismon *tajpi*» (pvz 1982: 239). Sturmer (1930: 61) asertas sen pravigo, ke la vorton *etoso* proponis li mem. Gacond (2007: 99) sciigas sen referenco, ke «La vorton *samideo* iniciatis Louis de Beaufront».⁹ Tiel iom post iom konturiĝas iaspeca mitologio ankaŭ ĉi-kampe...

3. La ekesto de HV

Hauptenthal (1992: 58) la unua eksplice pledis por verkado de HV: «La novaj gloraj esperantologoj kaj komputeraĵaj specialistoj farus bone, se ili revenus al la benediktana diligento de malnovaj tempoj kaj zorge kompilus historian vortaron. Tiam oni facile vidus, kio pretis jam kiam kaj ke multaj nunaj novigoj estas aŭ la dua malkovro de Ameriko aŭ la intenca revenado al la fontoj». Tamen lia pledo restis seneŝa ĉirkaŭ dek jarojn...

Verkante detalan artikolon pri la vorto *ambaŭ*, Neves (2003) devis okupiĝi i.a. pri ĝia historio. Helpe de taŭgaj referencverkoj — nome, Vilborg (1989: 30) kaj pvz (1976: 233) —, li tre facile eksciis, ke ĝi unuafoje aperis ĉe Zamenhof (1889: 113). Tamen li scivolis ankaŭ pri ĝia unua apero ekstervortara. Ĉi-foje nenio helpis. Li devis paciencas kaj diligente tralegi la densajn kolumnojn de *La Esperantisto*, paĝon post paĝo, ĝis li trovis la deziratan lokon.¹⁰ Temis pri laboro neimageble teda kaj temporaba. Tiam unuafoje venis al li en la kapon la ideo kunmeti vortaron, en kiu oni povus facile kaj rapide trovi tiaspecajn informojn pri la historio de almenaŭ niaj ĉefaj vortoj.

Tiu ideo fariĝis deziro, kiam li samjare koniĝis kun ĉi-tema artikolo el la plumo de Hauptenthal (2003). En sia kontribuajo la konata esperantologo ne nur prezentis detale la celojn, citmanieron kaj principojn de registrado de historia vortaro sed eĉ liveris 11-paĝan modelan fragmenton de ĉi-speca verko, elektinte tiucele fruan tradukon de Grabowski (1888). Tiam Neves komencis kolekti materialon kaj eĉ intencis tuj ekverki, sed pluraj cirkonstancoj de lia vivo igis lin ĉion plurfoje prokrasti kaj meti flanken, kaj nur somere de 2009 li komencis metode kaj sisteme traerpi la unuajn inku-

9 Tiun miton lanĉis Beaufront (1925: 140) mem, sed necesas pruvi tian unuafojecon per rigora leksikologia esplorado. Estas ja iom strange, ke la “lanĉinto” forĝesis enpreni la vorton en sian faman kaj plurfoje eldonitan (1902, 1903, 1904, 1905, 1907) vortaron esperanta-francan. Ahlberg (1905: 117), ekzemple, registris ĝin en sia vortaro, kiel tradukon de *meningsfrände*. ...

10 Tamen pro tiama manko de prepariteco por ĉi-speca tasko li preterlegis la efektive unuan aperon sur p. 4 de la unua jarkolekto, kaj tial en la menciita artikolo li erare aljuĝis la unuafojecon al citaĵo sur p. 47 de tia kolekto...

nablojn kaj efektive ekredaktis la vortaron. Du jarojn treniĝis tia laboro, i.a. ĉar li plurfoje ŝanĝis gravajn kriteriojn (ekzemple, en la komenco li enprenis ekzemplojn, poste li ilin forigis kaj ree enmetis), ĝis fine lia esploro atingis la lastan dokumenton el 1888.

La esploran kaj redaktan laboron Neves faris tute sola, sed li ricevis helpon de Reinhard Haupenthal per havigo de malnovaj tekstoj kaj dokumentoj kaj de aliaj kolegoj per konsiloj kaj tradukoj el fremdaj lingvoj kiel la rusa (Valentin Melnikov), pola (Wojtek Usakiewicz), jida kaj hebrea (Tsvi Sadan).

4. La unua eldono de HV kaj plua laboro

La unua eldono de HV, fare de Neves, aperis en 2011, ĉe Iltis, Germanio, sub la titolo *Historia Vortaro de Esperanto 1887–1888*, kiel 117-A4-paĝa kajero. Alude pri la «benediktana diligento de malnovaj tempoj», menciita de Haupenthal, la kovrilo montras longbarban monaĥon, sidantan ĉe ligna pupitro kaj absorbitan de skribado.

Por verki la vortaron, la aŭtoro kronologie esploris ĉiujn skribitajn dokumentojn (librojn, broŝurojn kaj eĉ korespondaĵojn) el tiu dujara periodo kaj metode registris ĉiujn vortojn (radikvortojn kaj kunmetaĵojn), kiuj aperas en ili. El lingva vidpunkto la plej gravaj verkoj de la unuaj du jaroj estas la diversaj eldonoj de la *Unua Libro* (1887, 1888) kaj la *Dua Libro* kun ĝia aparte aperinta *Aldono* (ambaŭ el 1888).

Tiu ĉi eldono de HV konsistas el 1.417 kapvortoj. Se oni dekalkulas 12 mallongigojn (kiuj prezentiĝas kiel apartaj kapvortoj, kiel *d-ro*, *t.e.*), la registritaj radikoj kalkuliĝas al 1.331 kaj estas tiel dividitaj:

1887: 1.011 radikoj, ĉiuj enkondukitaj de Zamenhof.

1888: 406 radikoj: 232 de Zamenhof, 111 de Einstein, 62 de Grabowski, 1 de Belmont.

Kvankam Einstein enkondukis multe pli da radikoj ol Grabowski, tamen nur 65 (t.e. 58,7%) el liaj radikoj plu estas uzataj en la nuna lingvo,¹¹ kaj la ceteraj restis hapaksaj,¹² dum Grabowski montriĝis pli trafa ol li, ĉar 46 (t.e. 74,2%)

11 aj, alfabet/, anser/, arm/, bek/, buljon/, ĉampan/, ĉapitr/, dan/, direkci/, dram/, fatal/, fig/, flat/, firm/ (en la senco de *firmao*), geometri/, gal/, glob/, generaci/, grek/, haleluja, Himalaj/, holand/, idol/, institut/, jud/, kal/, kanonik/, katastrof/, klub/, komedi/, komisi/, konferenc/, kontor/, kvak/, majest/, malaj/, manki/, manufaktur/, melodi/, mineral/, monument/, mul/, okcident/, orient/, pedant/, posed/, prebend/, psalm/, rafin/, reprezent/, rezerv/, ruin/, Satan/, sentenc/, seri/, skarab/, spektakl/, stil/, stud/, telegram/, teŭton/, tort/, universitat/.

12 Ekzemple: ajmer/ («sitel/»), epol/ («ŝultr/»), flum/ («river/»).

el liaj radikoj ankoraŭ apartenas al la nuna vortostoko.¹³ Plej trafe elstaras Zamenhof, ĉar el la radikoj, kiujn li enkondukis en 1887 kaj 1888, preskaŭ ĉiuj (99,1% kaj 97,4%, respektive) restas samforme en la lingvo.¹⁴ Belmont enkondukis nur unu radikon (*mebl/*) dum la menciita perido, sed temas pri la unua nezamenhofa radiko en la lingvo, do honoron al li!

Post publikigo de la unua eldono de HV, Neves plu laboris super la vortaro, kvankam nekontinue. Kun la helpo de Valentin Melnikov, li komencis esplori la vortaron *Rusa-Internacian (RE)* la unuan ampleksan vortaron nacilingva-esperantan (Zamenhof 1889), kiu montriĝis riĉa, surpriza (kaj malfacila) minejo. Tamen la malfacilaj cirkonstancoj de lia profesia vivo, kaj ankaŭ la apenaŭa atento, kiun la klerula esperantistaro donis al HV, senkuraĝigis lin, kaj tial lia esplorado haltis ĉe la 77a paĝo de tiu grava 232-paĝa vortaro zamenhofa. La malneto kuŝis preskaŭ senŝanĝe ĉirkaŭ kvin jarojn, ĝis Bernhard Pabst, kontaktinte unuafoje la aŭtoron per Ipernity-mesaĝo je 2017-04-29, akceptis la defion daŭrigi la taskon kaj tiel savis HV de porĉiama stagnado. La posta disvolviĝo de HV ŝuldiĝas tute al la strebado, pacienca esplorado, iniciatemo kaj kompetenteco de tiu konata germana esperantologo.

5. La agado de Bernhard Pabst kaj lastatempa stato de HV (julie de 2018)

Denove kun dankinda helpo de Melnikov, Pabst fintraktis *RE* kaj registris la kompletan samjaran *MV (Meza Vortaro Esperanto-Germana, 73 p.)* de Zamenhof, kiu estas la ĉefa bazo de la *Universala Vortaro (UV)* el 1893, kiu en 1905 fariĝis parto de la Fundamento de Esperanto.

Pliaj fontoj el 1889 (parte) esploritaj kaj traktitaj de Pabst estas la unua Adresaro de Zamenhof, la latva lernolibro de Libeks, la germana lernolibro de la klubo Nurnberga, la sveda eldono de la Unua Libro, la traduko de *Gefratoj* (Grabowski) kaj la plej granda parto de la kvar kajeroj de *La Esperantisto*, aperintaj en 1889. Eksterperiode jam estas (parte) traserĉitaj i.a. la ĉeĥa lernolibro de Lorenz (1890), la *Kondukanto internacia de l' Interparolado*

13 *ari/*, *apetit/*, *asesor/*, *atest/*, *bandaĝ/*, *bibliotek/*, *boston/* (tamen por nomi specon de kartludo, ne valson), *botanik/*, *dam/*, *detal/*, *direkt/*, *diskret/*, *enigm/*, *fam/*, *febr/*, *frak/*, *guberni/*, *inspektor/*, *kapitan/*, *karakter/*, *kav/*, *koket/*, *komplot/*, *lag/*, *Moskv/*, *operaci/*, *opini/*, *pasi/*, *pin/*, *pozici/*, *pretekst/*, *regiment/*, *roman/*, *salik/*, *staci/*, *ŝal/*, *tirol/*, *triumf/*, *ulan/*, *vals/*, *vat/*, *verand/*, *vers/*, *verst/*, *Viln/*, *Vladimir/*.

14 Arkaikiĝis nur 8 radikoj el 1887 — ĉian, ian, kian, koron/, nenian, tian, sper/, vaks/ (en la senco de *kreski*) — kaj 6 el 1888: artikul/, ekzemplar/, ĥarakter/, kapris/, proteĝ/, torment/.

(Grabowski 1890), la traduko de la Biblia libro *Ruth* (1893), la *Preĝareto por Katolikoj* (de Beaufront 1893) kaj aliaj fontoj.

La nuna versio de HV, kiun Pabst pretigis julie de 2018,¹⁵ ampleksas jam 459 A4-paĝojn kaj enhavas 4.138 kapvortojn. Se oni denove dekalkulas la mallongigojn, la registritaj radikoj kalkuliĝas al 4.093, el kiuj 2.176 estis lanĉitaj en 1889.

Jen ekzemple la nuna stato de la artikoloj pri la radikoj **don/** kaj **ir/**, du el la plej detalaj en HV:

don/ [1887] **~i** Z UL 19 (*Panon nian ĉiutagan ~u al ni hodiaŭ*), 21 (*Estas necese, ke grandega nombro da personoj ~u sian voĉon*), 31 (*dek milionoj personoj ~is publike tian saman promeson*), [v], *Majn 87-2* (*Kian^o la gazeto komencos eliri, mi ~os en ĝi respondojn*), DL 3 (*mi ~us al la lingvo la finan formon*), 5 (*mi ~os al la dezirantoj sufiĉe da materialo por legi*), 11 (*Aliaj [...] ~is sole sensencajn ŝercojn*), 26 (*la balo, kiun ili hodiaŭ ~as*), 27 (*la bovino ~as lakton*), 28 (*Li ~as lecionojn de belskribado*), *Ald 4* (*ĝi {la kongreso} ~os neniam praktikajn rezultatojn*); *G Blov 6* (*Vladimiro [...] ŝin petegis, ke ŝi ~u sin al li*); *Z RE 24a* (*~i en la manon; вручать*), 105b (*~i trinki*), 106a (*~i nomon*), 116a (*~i piedveston*), 118a (*~i prunte*), 123b, 148b, 158b (*~i alnomon*), 162a (*~i lecionon; instrui*), 179b (*el~i*), 193a (*~i prunte*), 210b (*~i parton*), *MV*. || **~o** *Z RE 37a* (*даяние*). || **~ante** *G Blov 18* (*Mi faris sengardeme, ~ante min al la aminda emo*). **~inta** *Z Ald 3-4* (*Li petas siajn legantojn promesi lerni la lingvon nur tiam, se 10,000,000 personoj estos ~intaj tian saman promeson*). **~ito** *Majn Manf 91, 3* (*[la verko] igis min uzi la ~itojn de la poemo, por krei originalan verkon*). || **al~i** *Z UL 20* (*la folieto, kiun li al~is al sia letero*), *RE 39, 41, 103a, 136b, 147b, 151a, 153a, 153a* (*almeti*), 154b, *MV, GVG 3b* (*al~i aŭ depreni*). **al~ita** *Z Ald 6* (*La vortaro, kiu estas al~ita al mia unua broŝuro, estas ne plena*), *RE 147b* (*преданный* (adj.); «aldonita», kalkeo de ark. Ru: fidela, fidinda (adepto, amiko, ks.). Simile la tuj sekva *aldoniteco* (преданность): fideleco, fidindeco. Кр. simile *Ge hin | geb | ung | s | voll "sindonema" kaj Hin | gabe "sindonemo, sindono" (geben = doni)*, 151b (*dufoje*). **al~iteco** *Z RE 147b* (преданность), 151b. **al~itigi** *Z RE 152a*. **al~o** *Z Ald 1* [t] (*Al~o al la "Dua Libro de l' Lingvo Internacia"*), *RE 39, 152a*. **antaŭ~o** *Z RE 52*. **el~i** (*publikigi*) *Z Schl 87, 120* (*mi ricevis la eblon el~i mian verkon*), DL 3 (*mi intencis el~i libreton*), *RE 64* (*издавать*), 179b (*~i*). **el~o** *Z Majn 87-3* (*La germana el~o ankoraŭ ne estas preta*), DL 3 (*post tio ĉi oni jam povus komenci la el~on de plenaj vortaroj*). **el~adi** *Z Ald 12* (*ĝi estas tute ne malfacila por mi [...] el~adi [...] vortarojn ĉiam pli plenajn*). **el~ado** *Z Ald 5* (*La el~ado de la ceteraj kajeroj [...] ne estas bezona*). **el~ante** *Z DL 5* (*El~ante la "Duan Libron de l' lingvo internacia" [...], mi ~os al la dezirantoj sufiĉe da materialo por legi*). **el~anto** *Z Ald 17* (*La el~antojn [...] mi petas ankaŭ, ke*

15 Konsultebla ĉe: <https://esperanto-akademio.wikispaces.com/file/view/HV-13032018.pdf/627585487/HV-13032018.pdf>

en la fino de ĉia verko [...] ili presu ĉiam la plej novan el la diritaj nomaroj). **el~ata** Z DL 14 (en tiu ĉi lingvo estos el~ataj libroj kaj gazetoj). **el~inte** Z Ald 16 (El~inte la gramatikon [...], vi [...] donas al la tuta mondo la eblon korespondi libere). **el~ita** Z Majn 87-1 (verketo [...], kiu estos el~ita post 4-5 semajnoj), DL 4 (mi devus tro longe atendigi miajn korespondantojn, dum tiu libro estos preta kaj el~ita). **en~o** (ark., depono) Z RE 18a (вкладъ). || **for~i** Z DL 13 (mi for~os al ĝi la tutan aferon), RE 124a. **pli~i** Z RE 103a. **pro~i** Z RE 53. **pro~o** Z RE 53, 55. **re~i** Z DL 18 (li re~os, kion li prenis), 41 (Vojiro re~os al vi la fortojn), RE 20a (revenigi), 124a. **sur~i** Z RE 52 (задавать (задачу, урокъ), «taski»). **trans~ante** G *Blov* 3 [a] (La aŭtoro, trans~ante sian laboron al la estonta kongreso, foriras de l' sceno). **trans~i** Z RE 130b. || **leĝ~ado** G *Blov* 3 [a]. **leĝ~anta** Z *Schl* 87, 121. **leĝ~anto** Z Ald 9. **ofer~anto** G *Novj* 91, [3] (malbenante aŭ elridante^o la ofer~antojn). **prunt~anto** Z RE 53, 83a. **voĉ~o** Z DL 11 (tutmonda voĉ~o).

ir/ [1887] ~i Z UL 22 (Kiom de mi en silento / Al vi ~is jam oferoj!), 22 (Se mi al gajuloj ~as...), [v], DL 17 (Ni ~os al la patro), 19 (Ili kondukis la kolegojn en sian loĝejon, anstataŭ ~i kun ili en ilian), 20 (Ni ~u promeni, sinjoroj!), 25 (la kuracisto konsilis al mi ~i en ŝoitbanejon), 28 (≈u, sed ne revenu tro malfrue), 47 (Kiu ~as trankvile, ~as facile), Ald 10 (tiu proceso [...] ~os en ĝi multe pli rapide), RE 63b (идти), (144a (~i egale), 144b, 145b (iom ~i), 195a (~i la flankon; eviti), 219b, 227b (paŝi), MV. || ~o Z DL 14 (Sendepende de l' ~o de la voĉdono), RE 219b. || ~adi Z UL [v]; G *Blov* 11 (ĝi {la ĉevalo} komencis ~adi paŝe), 20 (sur la entrejo^o ~adis homoj); Z RE 162a (promenadi), 171a (promenadi), GVG 3b] (~adi tien kaj reen; auf und ab gehen). ~ado Z Ald 14 (la gazetoj ne alportas ĉiutage sensaciajn novaĵojn pri la ~ado de l' afero), RE 145b. ~anta G *Blov* 7 (li petegis ŝin per voĉo ~anta tra l' koro, ke ŝi rapidu por lin edziĝi). ~anto Einst *Plen* 88, 14 [g]. ~ilo Z RE 219b, MV (Stelze [sg.]). || ~tapiŝo Z RE 140b. || **al~i** Z DL 38 (se mi al~us proksime al la fraŭlino), RE 42. **al~o** Z RE 42 (доступъ, «al~o, al~ejo»). **al~ebla** Z RE 42. **antaŭ~anta** Z DL 7 (tiu sendu al mi la koston de l' venonta kajero tuj post la ricevo de l' antaŭ~anta), RE 149a. **antaŭ~i** Z RE 149a. || **de~i** Z RE 208b. **dis~i** Z UL Fr [v], DL 24 (Dis~u, sinjoroj, ĉar amase stari sur la strato estas malpermesita^o), RE 171a. **dis~adi** G *Blov* 10 (la nuboj dis~adis). || **ek~i** Z DL 21 (mi ek~s per grandaj paŝoj al la komercisto). **el~i** Z UL 23 (En tombo mi estas tenata, / Mi nur en la nokto el~as), Majn 87-2 (la ĵurnalo komencos el~i kredeble ĉirkaŭ la monato Januaro), DL 4 (de l' tago, kian^o el~is mia libreto), 7 (kian^o ĝi [...] el~os el la presejo), 31 (Tajloroj kaj botistoj [...] el~is sur la straton), 33 (la instruitulo el~is, por trinki kafon kaj legi gazetojn), 34 (li el~is en la lumon de l' suno), 39 (Mi el~is el tie), RE 27b (elpaŝi). **el~o** Z RE 28a, 68. **el~ante** Z DL 3 (El~ante ankoraŭ unu fojon antaŭ la estimata publiko). **el~inta** Z DL 5 (Kian^o la lasta kajero [...] estos el~inta, tian^o por la leganto nenio jam estos ne klara). **el~inte** Z DL 21 (El~inte el la kaleŝo [...], li ekrigardis min). **el~onta** Z DL 15 (vi

ricevos libron, kiu laŭ grandeco [...] egalas la el~ontan libron de l' voĉoj). **en~i** Z DL 22 (Li en~is la ĉambron (aŭ en la ĉambron)), 33 (nun la ombro devus [...] en~i), 33 (Estu tiel bona kaj en~u!), 37 (vi en~is tra la pordo), 39 (se vi tien en~is^o, vi ĉesus esti homo), Ald 10 (la vortoj feliĉe kreitaj [...] en~os en la lingvon); G Blov 12 (En~u varmiĝi!), 12 (La maljunuloj [...] en~is en la gastĉambron), 20 (mi [...] en~is en la preĝejon); Z RE 21b (войти), 25a (suriri; вступать), 25b, 59b. **en~o 1** (en~ejo) Z DL 33 (Kie estis la en~o?). **2** (ago en~i) G Blov 15 (li mortis en Moskvo, tagon antaŭ la en~o de la Francoj); RE 25a (вступление). **enterig~o** Z RE 146a. || **for~i** Z DL 5 (La persono de l' aŭtoro tian^o tute for~os de la sceno), 34 (ĝi [...] for~is kaj jam ne revenis), RE 126a, 215b. **for~anta** G Blov 3 [a] (la for~anta aŭtoro montras al ni [...] la vojon). **for~o** Z RE 215b. || **malsupren~i** Z RE 112a. **malsupren~o** Z RE 104a. **post~anta** (sekvanta) Z DL 33 (Je l' post~anta mateno la instruitulo el~is), 44 (Ĉe la post~anta danco la konfeso de ŝia amo sin trovis jam sur ŝia lango). **preter~i** Z RE 150a. **re~i** Z RE 20a (reveni), 126a. **re~o** Z GVGE 5a (trumpeti re~on; abblasen [ekz. atakon]). **revoj~i** G E-isto Jan. 1890, 27a (revoj~i sur maro silenta). || **senel~a** Z RE 54 (senel~a strateto). **senfor~a** Z RE 110a (dufoje). **sub~i** Z RE 53, 56, 59. **sub~o** Z RE 59. **sub~ejo** Einst Plen 88, 23 (de sur~ejo de la suno ĝis ĝia sub~ejo). **sub~inta** Z DL 31 (Nur je l' vespero, kian^o la suno estis sub~inta, ili reviviĝis). **supren~i** Z RE 23a (sur~i). **sur~i** Z RE 16, 23a (supren~i), 25. **sur~ejo** Einst Plen 88, 23 (de sur~ejo de la suno ĝis ĝia sub~ejo). **sur~o** Z RE 108a. || **tra~i** Z Schl 87, 120 (mi mem tra~is similan vojon), RE 12 (tra~i per la piedoj). **tra~ejo** Z RE 162a (tra~o). **tra~o** Z RE 162a (tra~ejo). **tra~inta** Z DL 4 (tian^o la lingvo jam estus tra~inta la juĝon de l' tuta mondo), 6-7 (ĝis tiu tempo ĝi jam estos tra~inta la juĝon de l' tuta mondo). **trans~i** Z DL 28 (Cezaro trans~is la Rubikonon), Ald 4 (la tuta sorto de l' lingvo [...] trans~as en la manojn de l' kongreso). || **Ĉiel~o** Z RE 21a, 214a (Ĉiel~o de Mario), MV 16. **milit~o** Z RE 145b. **pied~a** Z RE 165a. **pied~anto** Z RE 165a. **pied~e** Z RE 165a. **rapid~a** Z RE 183a (rapida). **ŝip~ebla** Z RE 197a. **voj~anto** Z RE 163b (vojaĝanto, migranto). **voj~i** G E-isto Jan. 1890, 27a (ni longe sur maroj voj~as). **voj~o** (vojaĝo) Z DL 41 (Voj~o redonos al vi la fortojn).

6. Estonteco de HV

La prilaboro de HV estas kolosa tasko, ege postula kaj temporaba. Kvankam la aŭtoroj evidente uzas komputilon por redakti kaj aranĝi la vortaron, tamen la tuta esplora laboro fariĝas “mane,” per tradicia metodo de atenta tralegado, kvazaŭ temus pri benediktana transskribado de malnovaj pergamenoj. Alie ne eblas plenumi esencan kondiĉon de HV: dokumenti antaŭ ĉio (sed ne nepre nur) la plej fruajn uzon de **ĉiu** vorto – tute egale, ĉu temas pri radiko, derivaĵo aŭ kunmetaĵo –, kun indiko pri ties aŭtoro, verko kaj paĝnumero.

La estonteco de HV do dependos ĉefe de la disponebleco tempa kaj mensa de ĝiaj aŭtoroj kaj kunlaborantoj kaj ankaŭ de ĝia plua recepcio¹⁶ inter nia klerularo.

Bibliografio

- Ahlberg, P. (1905). *Esperanto-Svensk Ordbok*. Stockholm: Stockholms Esperantoförening.
- Boulet, P. (1907). Pri "La Faraono". *Lingvo Internacia*, 12.3(159), 120–125.
- Boulet, P. (1908a). Pri "La Faraono". *Lingvo Internacia* 13.3(171), 121–127.
- Boulet, P. (1908b). Pri "La Faraono" (3-a volumo). *Lingvo Internacia* 13.6(174), 275–277.
- Boulet, P. (1908c). Pri "La Rabistoj". *Lingvo Internacia* 13.10(178), 466–470.
- Corret, P. (1907). Novaj vortoj en la dua eldono de la Esperanta-germana vortlibro. *Lingvo Internacia* 12.9(165), 409–413.
- De Beaufront, L. (1925). *Kompleta Gramatiko Detaloza di la Linguo Internaciona Ido*. Esch-sur-Alzette: Meier-Heucke.
- Gacond, C. (2007). Vivo kaj didaktika kontribuo de Louis de Beaufront (2). *Literatura Foiro*, 226, 99–102.
- Golden, B. (1992). Kiel nomi la riveron *Tajo/Tejo* en Esperanto? Metodologia studaĵo. *Nia Bulteno*, 2(56), 17–19.
- Grabowski, A. (1888). *La neĝa blovado*. Rakonto de A. Puŝkin'. Tradukis A. Grabowski'. Warsaw: Kelter.
- Hauptenthal, R. (1992). Esperanto ne ŝanĝiĝas (recenzo pri: B. Philippe: Sprachwandel bei einer Plansprache am Beispiel des Esperanto. Hartung-Gorre, 1991). *Iltis-Forumo*, 4(2), 57–58.
- Hauptenthal, R. (2003). Ni bezonas historian vortaron. In: I. Hauptenthal & R. Hauptenthal (Eds.), *Klaro kaj Elasto: Fest-libro por la 80a Naskiĝ-tago de Fernando de Diego* (pp.183-199). Schliengen: Edition Iltis.
- Neves, G. (2003). La Benjameno de nobela familio. *La Ondo de Esperanto*, 2(100), 13–15.
- Ito, K. (1976). *Hebreo el la Geto. De Cionismo al Hilelismo* (Iam kompletigota plena verkaro de I.I. Zamenhof, kajero 5). Kyoto: eldonejo ludovikito.
- Ito, K. (1982) *Korespondaĵo Ludovikologia* (Iam kompletigota plena verkaro de I.I. Zamenhof, kromkajero 2). Kyoto: eldonejo ludovikito.

¹⁶ **recepcio**. Maniero, en kiu homo aŭ grupo da homoj reagis al konkreta verk(ar)o, teorio, ideo, iniciato ks (По рецепция, R рецепция). Vorto lanĉita de Reinhard Hauptenthal en 1999 (en la postparolo de: Karolo Piĉ: *Kritiko kaj recenzistiko en Esperanto*. Saarbrücken: Edition Iltis 1999. p. 533).

- Stojan, P. E. (1929). *Bibliografio de Internacia Lingvo*. Tour de L'Île, Genève: Bibliografia Servo de Universala Esperanto-Asocio.
- Sturmer, K. R. C. (1930). *Por recenzo!* London: The Esperanto Publishing Co.
- Vilborg, E. (1989). *Etimologia Vortaro de Esperanto. Volumo 1: A-D*. Malmö: Eldona Societo Esperanto.
- Waringhien, G. (1989). *Lingvo kaj vivo*. Esperantologiaj eseoj. Dua reviziita eldono kun Apendico. Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio.
- Zamenhof, L. L. (1887): Дръ Эсперанто. Международный языкъ. Предисловіе и полный учебникъ. Por Rusoj. Warsaw: Typolithograph by H. Kelter.
- Zamenhof, L. L. (1888a). Dro Esperanto: *Dua libro de l' lingvo internacia*. Kajero n° 1. Warsaw: Kelter.
- Zamenhof, L. L. (1888b). *Aldono al la Dua Libro de l' Lingvo Internacia*. Warsaw: Kelter.
- Zamenhof, L. L. (1889): Дръ Эсперанто: *Полный словарь эсперантскаго (международнаго) языка. Часть русско-эсперантская. Plena vortaro rusa-internacia*. Warsaw: Self-published.

Pri la aŭtoro

Gonçalo Neves estas memstara tradukisto kaj leksikografo. Okupiĝas pri beletro, Esperantologio kaj interlingvistiko. Kunaŭtoro de *Ibere libere* (poemaro, 1993) kaj *Ekstremoj* (novelaro, 1997). Aŭtoro de *Kompreni* (novelaro, 1993), *Simptomoj* (poemaro, 2000), *Zamenhof kaj Volapük* (2011) kaj *Historia Vortaro de Esperanto 1887-1888* (2011, 2a eld. 2018), krom tradukinto de pluraj verkoj.

Retadreso: gneves64@gmail.com

About the author

Gonçalo Neves is a freelance translator and lexicographer working on literature, Esperanto studies and interlinguistics. Co-author of *Ibere libere* (collection of poems, 1993) and *Ekstremoj* (short stories, 1997). Author of *Kompreni* (short stories, 1993), *Simptomoj* (collection of poems, 2000), *Zamenhof kaj Volapük* (2011) and *Historia Vortaro de Esperanto 1887-1888* (2011, 2nd ed. 2018), as well as translator of several works.

Sobre o autor

Gonçalo Neves é tradutor autônomo e lexicógrafo, trabalhando nas áreas de literatura, Esperantologia e Interlinguística. Co-autor de *Ibere libere* (coletânea de poemas, 1993) e *Extremoj* (coletânea de contos, 1997). Autor de *Kompreni* (coletânea de contos, 1993), *Simptomoj* (coletânea de poemas, 2000), *Zamenhof kaj Volapük* (2011) e *Historia Vortaro de Esperanto 1887-1888* (2011, 2ª ed. 2018), bem como tradutor de várias obras.